

esperanto sub LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

julio - aŭgusto 2006 • numero 82 | volumo 14 - numero 4

Բոլոր մարդիկ ծնվում են ազատ ու հավասար իրենց

ყველა ადამიანი იბადება თავისუფალი და თანასწორი თავისი

모든 인간은 태어날 때부터 자유로우며 그 존엄과 권리에 있어

সমস্ত মানুষ স্বাধীনভাবে সমান মর্যাদা এবং অধিকার নিয়ে জন্মগ্রহণ করে

ਮਨੁੱਖਾਂ ਅਤੇ ਅਧਿਕਾਰੀਨੀ ਦ੍ਰਿਸ਼ਟੀ ਅੰਤਰ ਮਾਨਵੀ ਜਨਮਥੀ ਸੁਵਰਨ ਅਤੇ ਸਮਾਨ ਹੋਏ ਹੋ

يولد جميع الناس أحراراً متساوين في الكرامة والحقوق. وقد وهبوا

כל בני האדם נולדו בני חורין ושווים בערכם ובזכויותיהם.

すべての人間は、生まれながらにして自由であり、かつ、尊厳と

ເຮົາທຸກຄົນເກີດມາຢ່າງເຂັ້ມສະ ເຮົາທຸກຄົນມີຄວາມຄິດແລະຄວາມເຂົ້າໃຈເປັນພວມເຮົາເອງ ເຮົາ

Все люди рождаются свободными и равными в своем достоинстве и

Visi cilvēki piedzimst brīvi un vienlīdzīgi savā pašcienā un tiesībās. Viņi ir

سارے انسان آزاد تے حقوق تے عزت دے لحاظ نال برابر پیدا ہونے نیر۔ اوہ عقل سمجھ

Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili

Dek tri lingvoj, dek tri kulturoj, dek tri skribsistemoj, por prezenti tekston el la Universala Deklaro de Homaj Rajtoj. La dektria estas nun oficiale akceptita kiel LOTE en aŭstraliaj lernejoj. Por fariĝi agnoskita/diplomita Esperanto-instruisto, vidu paĝon 5.

ISSN 1039-9380

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Numero 82 • Vol 14. • julio-aŭgusto 2006

Redaktoro: Donald Broadribb

ELDONADO

Ĉi tiun numeron kompostis kaj aranĝis Donald Broadribb, per komputilo iMac, uzante la programon Mellel, kaj la tiparojn Futura, Onyx kaj New Century Schoolbook.

ABONOJ & PASINTAJ NUMEROJ

Abono kostas Aŭ\$40. Pagu al Libroservo de AEA, 143 Lawson St., Redfern NSW 2016 • Aŭstralio.
libroservo@esperanto.org.au

Por membroj, ekstraj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruc* kostas \$A3.00 + poŝtendokosto.

Pasintaj numeroj ankaŭ surrete elŝuteblas ĉe:

<http://www.esperanto.org.au/>

Esperanto sub La Suda Kruc estas aŭtomate sendata al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj sur paĝo 31 de ĉi tiu eldono.

Esperanto Sub La Suda Kruc

esk@esperanto.org.au

☎ (08) 9641 1937 • 📠 (08) 9641 1134

Pri opinioj aperantaj en ĉi tiu eldono respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

© 2006, AEA & NZEA — ĉiuj rajtoj rezervitaj.

La grafikan aspekton de la formato de *Esperanto sub la Suda Kruc* preparis Igor de Oliveira Couto.

En Ĉi Tiu Numero

Konu viajn kungesamideanojn: Nancy Roy.....	3
Pri la unua tago de la kurso en Universitato de Novsudkimrio (Nicole Else).....	4
Katja Steele invervjuas Igor Couto-n	5
Summer School also for our Children	7
Lerneja raporto 2005 (Gordon Coleman)	8
La plej novaj varoj ricevitaj de la Libroservo de UEA.....	10
Kiu estas la vera Pat Palmer? (Odlo Bokserp).....	11
Somerkursaro/Summer School 2008 (Debra McCarney).....	12
Mesaĝo de la sekretario	12
For the Beginner (Donald Broadribb).....	13
Bertilo Wennergren pri “devas ne”	16
Deziras korespondi.....	17
Korespondkurso servo de AEA 2005 (Hazel Green)	18
Esperanta futbalteamo	18
Recenzas via redaktoro: <i>Femina</i> ...19	
Skribas la legantoj: Franciska Toubale	20
Interrete.....	21
La origino kaj evoluo de lingveco (Brian Fox).....	22
Estas preta DVD <i>Gerda</i> <i>Malaperis</i>	29
Vintra Esperanto-Lernejo en Adelajdo 3-4 junio 2006 (Zbigniew Wybraniec)	30
<i>Esperanto sub la Suda Kruc</i> legeblas per Interreto ĉe http://esperanto.org.au	

Konu viajn kungesamideojn

Nancy Roy

intervjuita de Katja Steele

La avino de Nancy estis irlanda. Ŝia plej juna, 11a infano iĝis la patrino de Nancy. La patra flanko estis skota, tiuj geavoj havis 9 infanojn.

Estis 1934 kiam la gepatroj de Nancy geedziĝis. Nancy estis ilia unua posteulo kaj en la sekvo de pliaj jaroj venis aliaj kvin infanoj. La naskiĝloko de Nancy estis la vilaĝo Straiton en Britujo, sed baldaŭ poste la familio transloĝiĝis al Dailly. Tie Nancy frekventis la bazan lernejon kaj 13-jara ŝi ekvizitis la gimnazion en ne tre fora Girvan.

“Mi memoras la lunĉpaŭzojn en la gimnazio. La studentoj el la urbo iris hejmen, sed la junuloj el la ĉirkaŭaj vilaĝoj havis liberan tempon, en kiu ili ofte luis remboatojn kaj remis en la haveno aŭ ĝis la rivero. Aliajn tagojn ni ludis specon de golfo, en vintro aŭ ĝenerale en la malvarmaj tagoj ni vizitis la bibliotekon aŭ la butikojn.

Sekvis kolegio en Glasgovo, de kie por la semajnfinoj Nancy kutime iris hejmen.

Ŝia unua laborposteno estis en oficejo kun butiko, sed ĝi daŭris nur unu monaton, ĉar ĝi ne kontentigis Nancyn. La oficeja laboro en urbo Maybole estis jam plaĉa, ŝi restis tie unu jaron kaj dume ekkonis la knabon, kiu poste iĝis ŝia edzo. Du jarojn ŝi laboris por la registaro rilate la pensiojn.

“Mia amiko iĝis soldato kaj iris al Honkongo. Mi ricevis laboron en Parizo, post ses monatoj alian postenon ĉe SHAFE (Supreme Headquarters Allied Forces in Europe). Ĝi estis bona laboro, ni veturis al Hispanujo, Svisujo, Nederlando kaj Belgujo. Du jarojn poste mi, pro diversaj kialoj, rezignis je tiu posteno kaj iris al Londono, kie mi laboris en laboragentejo. Dum tiu tempo revenis mia amiko el Honkongo. Mallonge post tio mi reiris hejmen kaj trovis bonan laboron en la flughaveno.”

Unu jaron post sia geedziĝo Nancy kaj Charlie elmigris al Aŭstralio, al Adelajdo (1959), kie ili ambaŭ rapide trovis laboron. Ilia unua infano naskiĝis en 1961 kaj baldaŭ post tio ili aĉetis malnovan domon en Rosewater. Post la alveno de la dua infano ili aĉetis terpecon en Holden Hill kaj konstruigis domon, en kiu Nancy loĝas ĝis nun. La tria kaj lasta infano naskiĝis ses monatojn post la translokiĝo.

“Tiam mi havis ekstreme malmulte da mono. Mi laboris dum du jaroj vespere kaj kiam Margaret, la plej juna infano, iris al la lernejo, mi trovis dumtagan postenon. Fine mi eklaboris kiel instruistino. Tion mi ŝatis, ĉar mi havis libertempon kune kun la infanoj. Ĉio estis bona dum tiu tempo.” La tuta familio la

unuan fojon vizitis la parencojn en Skotlando kaj ili feriadis ĉiujare.

“En 1981 Charlie iĝis malsana kaj mortis. Niaj filoj tiutempe jam laboris, sed la filino estis nur en la 12a klaso. Fine de la jaro mi foriris el mia laborposteno kaj kune kun la filino refoje vizitis Skotlandon. Post la reveno al Adelajdo ni ambaŭ ekstudis en la universitato, mi por ricevi diplomon pri instrukapablo.”

Nancy refoje enposteniĝis en Salisbury en 1983 kaj restis tie ĝis sia pensiuliĝo en 1997.

“Mi prenis libertempon en 1988 kaj dum unu jaro loĝis kun mia patrino. Nun mi ĝuas la emeritiĝon. Mi vizitadas Skotlandon ĉiun duan

aŭ trian jaron kaj al mi venadas mia pli juna fratino.”

Nun Nancy loĝas kun sia filo. Ŝia filino edziniĝis kaj loĝas en Sidnejo.

La rilato de Nancy al Esperanto komenciĝis antaŭ kvar jaroj. En la komunuma ĝardeno ŝi renkontis esperantistinon Gloria Bristow kaj eklernis la lingvon en ŝia klaso. Pere de la reto ŝi baldaŭ trovis pliajn informojn kaj adresojn rilate la lokan movadon, kontaktis la aktivulojn kaj mem ekpartoprenis la Esperanto-aranĝojn. Kompreneble ŝi ĉeestis la Somerkursaron en Adelajdo en 2005 kaj ankaŭ la ĉijaran en Kinniny. □



Pri la unua tago de la kurso en la Universitato de Novsudkimrujo. de Nicole Else

En la klaso estas proksimume 23 gestudentoj de diversaj aĝoj. Plej multaj estas studentoj kiuj deziras instrui la anglan lingvon eksterlande. Ĉeestas la kurson 3 esperantistoj: Miranda Lutz, Igor Couto kaj mi. Daniel Kane instruos al ni pri Esperanto-gramatiko dum proksimume 12 horoj, la ceteraj klasoj estas kune kun la studentoj kiuj deziras lerni instrui la anglan aŭ alian lingvon.

Atendante la komencon de la leciono, ni 3 kompreneble interbabilis en Esperanto, do la aliaj studentoj jam aŭdis Esperanton. Komence ni devis fari ekzercon simple

por interkonatiĝi kaj ni devis fari demandojn unu al la aliaj. Unu demando estis: Kial vi volas ĉeesti tiun kurson? Kompreneble ni 3 respondis, ke ni deziras lerni instrui Esperanton. Iuj studentoj neniam aŭdis pri Esperanto, do jam necesis mallonge klarigi. Mi surpriziĝis kiam unu studentino alparolis min per “Saluton”. Evidente ŝi estis ĵus parolinta kun Igor aŭ Miranda. Post iometa interkonatiĝo, ni devis promeni tra la universitato, por ekscii, kie troviĝas la biblioteko, la manĝejo, ktp.

Post la paŭzo estis alia instruistino. Kaj surprizo! Ŝi ne parolis la

anglan, ŝi parolis al ni dum duon-horo nur en la hungara lingvo. Per rekta metodo ŝi instruis al ni la hungaran. Plej multaj studentoj tute ne sciis, kiun lingvon ŝi uzas. Mi tamen rekonis, ke temas pri la hungara ĉar mi iom studis ĝin antaŭ 20 jaroj. Ĉar mi tute ne havis okazon uzi la hungaran dum 20 jaroj, mi preskaŭ nenion memoris, tamen kiam li instruistino diris la vortojn “jes, dankon” en la hungara, mi tut-certis, ke temas pri la hungara. Ni lernis diri facilajn frazojn, kiaj “mi nomiĝas Nicole”, “mi loĝas en Sydney”, ktp. La celo de la leciono kompreneble ne estis instrui al ni la hungaran, sed instrui al ni, kiel la rekta metodo de lingvoinstruado funkcias.

Dum tiu unua tago mi jam rimarkis du instrumentojn kiuj ne estis uzataj en la tempo kiam mi estis lernejanino. Mi memoras, ke dum la lecionoj ni devis kutime sidi dum la tuta tempo. Tie ĉi ni ege ofte devis ekstari por trovi partneron kun kiu interparoli. Ne estis risko endormiĝi kun tiom da piedirado tra la klaso. Dua tekniko uzata kiam mi neniam spertis antaŭe estas ke la instruistino demandas ion, sed tute ne atendas ke iu tuj respondu, ŝi petas, ke ni unue interparolu inter ni, kaj nur poste iu en la klaso laŭte diras la respondon. Tiamaniere estas malpli da streĉo en la klaso kaj studentoj pli bone sukcesas memori.

□

Katja Steele intervjuas Igor Couto-n pri la nova kurso por Esperanto-instruistoj

Ni legis en EJK (majo-junio 2006) kaj en revuo Esperanto (majo 2006) ke la publika universitato University of New South Wales (Universitato de Nova Sudkimrujo) en Sidnejo lanĉis oficialan kurson pri instruado de Esperanto. Pasis jam kelkaj semajnoj el la ses-monata studperiodo kaj ni demandas pri la detaloj de la Aŭstralie unika okazaĵo Igor-on de Oliveira Couto.

Kies ideo estis krei ŝtate agnoskitan kurson pri Esperanto? Kiu iniciatis ĝin?

Estis mi, kiu kontaktis Universitaton de NSK (Nova Sudkimrujo), sed la sugesto venis de Penny Vos. La historio komenciĝis per la konstato, ke en NSK ni havas multajn bone parolantajn esperantistojn, sed mankas Esperanto-instruistoj. Ĉar Penny estas la prezidanto de la Aŭstralia sekcio de ILEI (Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj), mi kontaktis ŝin kaj ŝi faris esploron pri la ekzistantaj kursebloj. En la tuta lando ŝi trovis nenium, sed mal-kovris, ke estas interesa grupo en la universitato de NSK, kiu pretas labori per diversaj fremdaj lingvoj. Ti-



Igor Couto

ujn homojn mi kontaktis. Ili trovis Esperanton interesa kaj decidis kunlabori kun ni.

Ĉu vi renkontis grandajn problemojn ĉe la realigo de la ideo?

Estis kaj ankoraŭ ekzistas kelkaj obstakloj. Ĉar tiu kurso estas oficiala kurso de la universitato kaj agnoskita de la aŭstralia registaro, la kursfinintoj ricevas oficialan atestilon, kiu rajtigas ilin instrui, ekz. ĉe TAFE (Tertiary and Further Education – Triagrada edukado) en Aŭstralio. Sed, por tio unu el la kondiĉoj estas, ke la studentoj devas praktiki la lernatajn metodologiojn en la jam ekzistantaj klasoj. Por la diversaj lingvoj estas sufiĉe simple trovi klasojn de lernantoj, sed en la Esperanto-movado tute ne. Precipe ne en Sidnejo. Pro tio mi bezonis kontakti la esperantistaron en la tuta lando demandante pri la ekzistantaj kursoj.

Alia speco de obstakloj estis konvinki la homojn en la akademias rondo, ke ankaŭ Esperanto estas vera lingvo, ke valoras ĝin instrui kaj lerni. Doktorino Jill Murray, kiu prizorgas la Instituton de Lingvoj

de la universitato, devis konvinki plurajn siajn kolegojn, ke valoras la penon aranĝi la kurson.

Kvankam ni devis multe klopodi, ĉiuj aperintaj obstakloj estis fakte bonaj oportunoj por ni. Ekz., pro la neceso kontakti la aliajn grupojn en Aŭstralio ni eble instigis plurajn el ili aranĝi kursojn. Same pri la akademias problemoj: pro la multaj diskutoj kaj klarigoj, kiujn d-rino Murray havis kun siaj kolegoj pri nia kurso, ni jam sufiĉe vaste promociis en la universitataj rondo, la valorojn de Esperanto.

Ĉu vi povus prezenti profesoron Daniel Kane, kiu instruas nun la E-kurson?

Mi konatiĝis kun li en 2000 en Sidnejo. Li estis instruanta en la tiea somerlernejo. Por mi estas ĉiam granda plezuro paroli kun li, ĉar li estas bonega esperantisto, lia lingvo estas absolute perfekta kaj estas bona ekzemplo por mi. Li loĝis dum multaj jaroj en Ĉinio, kunlaboris kun la tieaj esperantistoj, laboris por la Aŭstralia ambasadejo en Ĉinio. Nun li laboras por la Ĉina ambasadejo en Aŭstralio kiel interpretisto kaj tradukisto. Li estas ankaŭ estro de la *Fakultato de Lingvoj* de la Universitato de Sidnejo kaj verkisto, do ne eblas konvinki lin pli vigle partopreni en la movado en Sidnejo, ĉar li apenaŭ havas liberan tempon. Sed ni bezonis lertan esperantistan instruiston, kiu povas instrui la gramatikan parton de la kurso en Esperanto, kaj miaj petegoj atingis la celon: d-ro Kane akceptis la taskon.

Kiom da instruistoj kunrolas en la kurso?

Daniel Kane instruos per Esperanto pri la esperanta gramatiko. Pri la instru-metodologio prelegos 3 aliaj instruistoj en la angla. Unu el ili estas la jam menciita estrino de la *Instituto de Lingvoj*.

Ĉu vi ricevis iujn reagojn, eble eĉ eksterlandajn, al la kurso?

Jes. Fakte tio ege surprizis nin. Nia baza intenco estis profesiigi la lokan movadon, krei pli da instruistoj. Post kiam ni anoncis la kurson en diversaj Aŭstraliaj Esperanto-grupoj, kelkaj homoj plusendis la informon eksterlanden. La mesaĝo aperis en diversaj eksterlandaj gazetoj kune kun nia anonco, ke la Esperanto-Federacio de NSK havas stipendion por tiuj, kiuj pretas studi la kurson kaj poste labori 2 jarojn por la Federacio. La propono montriĝis interesa por pluraj eksterlandaj esperantistoj kaj ni ricevis pli-malpli 20 aliĝpetojn el diversaj kontinentoj. Mi ĝojas, ke oni interesiĝas pri

la kurso.

Ĉu estas eblo, ke ankaŭ eksterlandanoj povas studi en Sidnejo?

Principe jes, sed nun obstaklas, ke la kurso estas partatempa kaj daŭras 6 monatojn. Sed pro tiu granda eksterlanda interesiĝo la estrino de la kurso konsideras nun fari version de ĝi, kiu ests plentempa kaj daŭros nur 2 monatojn.

Vi mem studas en la menciita universitata kurso.

Unue mi ne intencis partopreni ĝin, sed la Sidnejanoj konvinkis min, dirante, ke estas necesaj du instruistoj (Nicole Else estas la alia Sidneja studentino). Estas grave, ke la universitata atestilo donos al ni eblon instrui ne nur loke, sed eĉ eksterlande.

La granda unua paŝo estas do farita, gratulon! Ni deziras al ĉiuj koncernatoj glatan marŝon antaŭen kaj esperas baldaŭ aŭdi-legi pri viaj novaĵoj. □



Summer School also for our Children

To organize a special class for children up to 12 years of age, we need to know now how many of them are likely to come to the next Somerkursaro in Hobart (7-19 Jan., 2007).

Depending on funds available, and on the number coming, AEA intends to partly or wholly subsidize the accommodation costs for children of that age. If you plan to bring children, be so kind as to inform us in the coming few weeks (you dont have to send in your application form yet). Write to:

Marcel Leereveld
12 Heather Grove
Belgrave South Vic. 3160
or email: mleereveld@yahoo.com.au

□

LERNEJA RAPORTO – 2005

de Gordon Coleman

tr. de Max Wearing

Kiam Ŝandor Horvath petis, ke mi preparu tiun ĉi raporton, mi ne certis pri liaj intencoj, kaj ne sciis kiamaniere trakti la temon. Do, mi elektis doni mallongan resumon de la eventoj, kiuj logis min al la espero fariĝi esperantisto kaj enkonduki Esperanton al mia klaso de lernantoj ĉe Elementa Lernejo “Hackham South”.

Je la komenco mi volas danki al mia kara amiko, Max Wearing, pro liaj daŭraj subteno, pacienco, kuragiĝo kaj ĝenerala helpemo.

Do . . . Esperanto kaj mi . . .

Mi aŭdis la vorton “Esperanto” dum la 1950-aj jaroj, kiam mi estis lernejano en Londono. Mia edzino, Ann, samaĝe aŭdis pri la lingvo en Skotlando. Esperanto estis por mi lingvo de spionoj (ĉar mia patro tiam estis membro de la Brita Komunista Partio), kaj por mia edzino ĝi ŝajnis lingvo de komerco.

Poste, pri Esperanto mi aŭdis nenion — dum pli ol 40 jaroj, nenion! — ĝis januaro, 2005. Veturante per aŭtomobilo en Adelajdo, mi aŭdis radio-intervjuon pri la adelajda Esperanto-somerkursaro de 2005. Spite de vojaĝado kaj loĝado en Anglio, Germanio, Singapuro, Danlando kaj (kompreneble) Aŭstralio mi nek vidis nek aŭdis la vorton. Post la radio-intervjuo, mi trovis la nomon kaj telefon-numer-

on de Max Wearing. Li invitis min tagmanĝi kun li ĉe la somerkursaro. Tia estis mia unua konatiĝo kun esperantisto, kaj la entuziasmo kaj dediĉo de Max rilate la lingvon ege impresis min.

Du tagojn poste mi pasigis du horojn ĉe Max. Li enkondukis min al la bazoj de la lingvo, kaj mi ekvidis tuj la avantaĝojn, kiujn Esperanto povas doni al unulingvanoj kiaj mi kaj miaj lernantoj en elementaj lernejoj.

Mi decidis, do, fariĝi esperantisto kaj enkonduki la lingvon al mia klaso kiel specialan studobjekton por tiu nova jaro. Kvankam nia lernejo jam studis la francan kiel LOTE(n) (fremdan lingvon) dum 5 aŭ 6 jaroj, tamen neniu el ni kapablis ĝin paroli — sufiĉe ofta sperto rilate al LOTE en aŭstraliaj lernejoj, ĉu ne?

Farinte mian decidon, mi traserĉis (kun la helpo de mia edzino) adelajdajn librovendejojn por trovi brokantajn Esperanto-lernolibrojn. Ni sukcesis aĉeti la vortarojn de Wells, Butler, kaj Millidge kaj lernolibrojn de Butler (*Esperanto For Beginners* kaj *Step By Step In Esperanto*), Cox (*Esperanto Grammar And Commentary*), kaj Stuttard (*The Esperanto Teacher*).

La reto

Tiam mi ekserĉis en Interreto, kaj

per la uzo de “Yahoo” kaj la vorto “Esperanto”, mi informiĝis pri gravaj Esperanto-varbiloj:

<http://www.lernu.net> kaj <http://www.cursodeesperanto.com.br> kiuj proponas senpagajn kursojn valoregajn por lernantoj. Dum liberaj horoj miaj lernantoj nun tre ŝatas esperantumi en la lerneja komputilejo. Mi kredas, ke oni devus multe pagi por samnivelaj kursoj en naciaj lingvoj. *Lernu* permesas, ke oni kopiu ĉion — altvalora bonefiko!

Ĉiuj miaj lernantoj registriĝis ĉe *Lernu* kaj *Kurso de Esperanto*, uzante la komputilojn en mia klasĉambro kaj tiujn en la komputilejo — kelkaj eĉ hejme!

Mi “vizitis” komputile Britan Esperanto-Asocion kaj UEAn, kaj uzis la telefonon de la lernejo por mendi eĉ aliajn lernilojn: ekz *Urso Kurso*, *Mil unuaj vortoj en Esperanto*, *Mini Dictionary*, kaj bonegan libreton *Look at Esperanto*. Ĉiujn tiujn eldonaĵojn mi aĉetis, uzante mian klasbuĝeton. Ili ĉiuj estas rekomenditaj de la programo *Springboard to Languages*, eldonaĵo de Brita Esperanto-Asocio, kiu rekomendas anglajn lernolibrojn por la studado de Esperanto kiel unua fremda lingvo.

Helpite de la libroservanto en mia lernejo, mi aĉetis kelkajn Esperanto-afiŝojn kaj alian kurson, *Ni komencu*, de LOTE-fako en Okcident-aŭstralio.

En la lernejo

Je la komenco de la lernejjaro 2005, mi informis mian lernejestron pri miaj planoj enkonduki Esperanton

al mia klaso, kaj li donis sian subtenon. Li kredas, kiel mi, ke se lernantoj ĝuas eksciojn, ili lernas pli rapide kaj facile. Ni kredas, ke ju pli ekkonas lernantoj, des pli ili sorbos. Mi kredas, ke se lernantoj gustumas sukceson, ili daŭre sukcesos, kaj mi forte kredas, ke Esperanto, la grandioza donaco de Zamenhof al la homaro, estas sukcesiga.

La unuan tagon de la lerneja novjaro mi enkondukis al mia klaso la alfabeton, kaj la manieron literumi la numeralojn, unu ĝis dek. Post du tagoj mi testis la literumadon de 100 vortoj, inkluzive de la enkondukitaj esperantaj. La rezulto estis ĝojiga, ĉar 95% el la klaso faris ĝustajn respondojn.

La lernejo kie mi instruas situas sude de Adelajdo kaj havas nemerititan reputacion esti lernejo “malfacila” kun lernantoj “malfacilaj”. Kompreneble ĉiuj lernejoj (kaj ŝtataj kaj privataj) havas almenaŭ kelkajn malfacilajn lernantojn, sed la plejmulto el niaj lernantoj estas laboremaj, respektemaj kaj entuziasmaj. Estas plezuro instrui ilin. Niaj lernantoj venas plejparte el malriĉaj familioj, el kiuj kelkaj estas aŭ senpatraj aŭ senpatrinaj. Ili suferas multajn malavantaĝojn (ne nur la ĉeeston de mi kiel instruisto!) Ili estas, tamen, bonega grupo de infanoj, kiuj volas plaĉi kaj progresi (same kiel aliaj infangrupoj). Mi tre fieras pri ili kaj iliaj atingoj.

Estis granda plezuro vidi ilian memfidon antaŭ nelonge kiam vizitis nin Ŝandor Horvath kun grupo

de liaj plenkreskaj aziaj studentoj pri la angla lingvo. Parto de la programo estis Esperanto-leciono farita de miaj lernantoj por la studentoj de Ŝandor. Ĝi sufiĉe bone sukcesis. Efektive, japana studentino diris al sia “instruantino”, ke ŝi volas daŭrigi sian studadon de Esperanto en Japanio. Ni donis al ŝi la adreson en Japanio de esperantisto, kun kiu mi konatiĝis en NASK-kurso (en Usono) en julio. Mi certas, ke dum ni daŭrigos nian Esperanto-studadon venontjare, miaj lernantoj bone progresos, kaj ke ili fariĝos bonaj ambasadoroj por la lingvo.

Do, kio atendas nin en 2006?

Mi jam planis Esperanto-paĝon por nia lerneja retejo. Kvankam ĝi baze konsistas el kelkaj retadreso, mi tamen kredas, ke tiuj, kiujn mi elektis tre utilos al homoj kiuj volas informiĝi pri la lingvo. Vidu:

www.hacksthps.sa.edu.au

Mi intencas daŭre inviti Ŝandoron kaj liajn studentojn viziti nin en nia lernejo. Mi esperas, ke ili akceptos la inviton, ĉar mi kredas, ke tio prezentas bonan okazon por prezenti Esperanton al alilandanoj kaj rapide propagandi al multaj homoj, samtempe kreskigante la memfidon de miaj propraj lernantoj.

Mi intencas sendi pakaĵon da informiloj al kelkaj lokaj politikistoj: ekz Mike Rann, ĉefministro de Sudaŭstralio; Jane Lomac-Smith, ministro pri edukado; kaj Robert Brokenshire, Rob Lucas kaj aliaj membroj de la opozicia partio — por ke ili bone komprenu la potencialon de Esperanto en LOTE-instruado.

Oni jam invitis min sendi al retinformejo detalojn pri novenkondukaj kursoj en ŝtataj lernejoj. Tiujn informojn ricevos instruistoj ne nur en Sudaŭstralio, sed ankaŭ en aliaj aŭstraliaj regionoj kaj eĉ en aliaj landoj.

Evidente mi daŭrigos mian propran studadon pri Esperanto por pliboniĝi kiel Esperanto-instruisto kaj ambasadoro por Esperanto. Do, jen la komenco de mia vojaĝo en Esperanto-instruado. Por kelkaj, eble, ĝi ŝajnas ne tre impona, sed por mi ĝi postulis fortan strebadon, ĉar antaŭ nelonge mi estis sindediĉe unulingva. Diable, mi estas eĉ anglo! Ni angloj jam regis duonon de la mondo, kredante ke la tuta mondo devus paroli angle! Sed mi nun agnoskas, ke meritas spacon ankaŭ Esperanto. Mi esperas eĉ kontribui al ĝia disvastiĝo, kaj instigi aliajn instruistojn sekvi la saman vojon. □



La plej novaj varoj ricevitaj de la Libroservo de UEA


Kun Diablo en la korpo, **Raymond Radiguet**, Prozo tradukita, Mondial, 2006. Ĉefverko de amromano, modelo de klasika stilo kaj grava mejloŝtono survoje al renovigo de la romana genro franclingva. Prezo: €12.90. Pliaj infomoj, reta mendilo: <http://katalogo.uea.org?inf=7556>. □

Kiu estas la vera Pat Palmer? de Odlo Bokserp

Fotokonfuzo

En nia ĵusa numero de *ESK*, nia senpensa Reaktoro prezentis intervjuon kun Patricia Palmer [intervjuo ŝtelita, kompreneble, el la revueto *Tamen Plu*], kun unu el la kvar fotoj aperintaj origine en tiu revueto.

Bone memoru ke la titolo de la artikolo estis “Patricia Palmer, intervjuita de Katja Steele”. Jen la kvar fotoj, kiaj ili aperis en *Tamen Plu*:



(sen identiga nomo, ĉar evidente, en artikolo temanta pri Patricia Palmer, la unua foto ja temas pri ŝi:)

Iom sube, en la originalo, aperis dua foto:



ankaŭ sen identiga nomo, ĉar tut-evidente jen varianto de la unua foto.

Ĉe la malsupro de la unua kolumno estas tria foto:



Pat

ĉifoje kun nomo; kaj fine,




Helena kaj Pat

en preskaŭ la mezo de la dua kolumno.

Do

nia genia Reaktoro presigis nur unu el la kvar fotoj, sed kompensis tion per ĉi tiu majstra aliigo:



Helena Palmer

Nu, se nia amata Reaktoro ne estus tute blinda, kaj, krome, ne kon-

servus sian dumililitran cerbon en vitra poto en la Muzeo de Kuriozaĵoj en Katmanduo, eble li rimarkus erareton en sia identigo de la foto. Sed miraklojn ni ne atendu...

Intertempe, mi transprenis oficialan redaktadon de *ESK*, kaj povas promesi ke mi ne (pliprecize: ne ekzakte) ripetos ĝuste tiun eraron.

Odlo Bokserp



Somerkursaro/Summer School 2008

Debra McCarney


Ĉu iu havas opinionon pri la loko de la AEA somerkursaro por 2008 kaj 2009?

La venonta, 2007, okazos en Hobart, kaj nun ni devas decidi ĉu Sidnejo aŭ Aŭklando por 2008 (Ĝi estos kuna somerkursaro — Aŭstralio kaj Novze-lando) kaj se Aŭklando, ĉu Sidnejo por 2009? Bonvolu respondi rapide, kaj mi kolektos kaj sendos la respondojn al AEA.

Does anyone have an opinion on the location of the AEA summer school for 2008 and 2009?

The next one, in 2007, will be in Hobart. We need to decide whether to hold the following one in Sydney or Auckland (it will be a joint Australia/New Zealand Summer school), and if Auckland is preferred should we hold it in Sydney in 2009, or make the decision later? Please send your responses to me ASAP, and I'll forward the collected results to the AEA.

debra1@ii.net



Mesaĝo de la Sekretario

Nun estas bona tempo por pensi pri ĉu vi volas esti Estrarano en 2007! La limdato por formularo por nomumi personon por esti estrarano en 2007 estos la 9 de Novembro 2006. La formularo estos havebla ĉe:

www.esperanto.org.au/aea/esperanto/esperanto/dokumentoj

kaj en venonta eldono de *ESK*.



• for the beginner

by Donald Broadribb

Confusion

Quite a few people have written questioning the bit in the last issue of *EPK* (*EPK* 81, p.14) about the phrase *ne devas*. Obviously I failed to make it clear that I was **not** making a recommendation to use *ne devas* in the sense of “must not”, but merely registering common Esperanto usage. The particular use of *ne devas* as meaning “must not” goes back to the initiator of Esperanto, L.L. Zamenhof, who regularly used it in this way, and that usage has become established in Esperanto ever since.

There is nothing wrong with using the phrase in English fashion,¹ but beginners should be aware that they may sometimes be misunderstood by non-English speakers, since the majority of European languages use the equivalent of *ne devas* to mean “must not”. There is a good discussion of the topic in Wennergren’s newly published *Plena manlibro de Esperanta gramatiko*. and I suggest that you try your hand at reading his text, which is reprinted following this article.²

¹ i.e. *ne devas* = does not have to; *devas* *ne* = must not.

² Those fortunate enough to own a copy of the out-of-print *Plena analiza gramatiko* will find a very brief mention of Zamenhof’s usage of *ne devas* in §91,

Simpatia

The word *simpatia* looks like, and in the Esperanto dictionaries is defined like, the English word “sympathetic”. NPIV³ defines it:

“Naskanta simpatio.”

and *simpatia* is defined:

“Reciproka inklino de du personoj, bazita sur simileco de gustoj, temperamentoj, opinioj ks. — Favora inklino de iu por alia persono, kies sentojn tiu iel divididas.”

In other words, “having sympathy for someone, whose feelings you share”, essentially the meaning of the English “sympathetic”.

Rather extraordinarily, however, you will find in your reading that very frequently the word *simpatia* is used to mean “nice, pleasant; attractive”. The reason for this is that in many European languages the cognate word means “friendly, or attractive”. For example, in Spanish “el es muy simpático” means “he is very attractive”.

Despite this popular tendency to use *simpatia* in the meaning of “pleasant, attractive”, I do not recommend it, since those meanings

Rim.3. However, it gives no recommendations.

³ *Nova plena ilustrita vortaro de Esperanto*

are already well covered by *placa* and *alloga*.

Quotation marks

There has never been any consensus about quotation marks in printing Esperanto. The reason for this is that almost every language has its own system of quotation marks, and there is no single system which can be properly called an international standard.

By and large, Esperantists have from the beginning been accustomed to seeing many systems of quotation marks used in their printed literature, and they rarely have a problem with this, after becoming accustomed to the fact.

Apart from the quotation marks used in English: “ ” ‘ ’, you will find that in printed Esperanto literature „ ”, ‘ « » ‹ › ’ and — are very frequently used, in various combinations. Here are a few samples taken from present day Esperanto literature printed in various countries:

„Obee mi raportas...kaj atendas la respondon.“

And as an indirect quotation: 'mia onklino — via onklino'. [*Czech Republic*]

— Ankaŭ ili ne estas la ĝustaj! — kriis li kolere.

And for an indirect quotation: „Signifa parto de la spektantoj” [*Hungary*]

“For pro gravaj aferoj. Revenos post unu horo”. — Ĝi tekstis.

[*Russia*]

And: — Mi estis pensanta, princo... — komencis la lombardisto. [*Russia*]

— Mi pensas, — ŝi diris, — kaj mi... [*Poland*]

— Vi estas bona, sed lasu min, ŝi tiam diris. Mi ne povas paroli pri tio. [*Denmark*]

This last example requires that the readers work out for themselves where the quotation ends (i.e. after the word *min*) and where it recommences (i.e. with the word *Mi*. As with many languages which customarily use the symbol — to indicate the start of a quotation, the end of the quotation is very often not indicated; as a rule, there is no indication given when the end of the quotation coincides with the end of a paragraph.

This is not an exhaustive list of the ways in which quotations are indicated in various countries, but merely a few examples.

Although various systems are in use, readers of Esperanto are accustomed to the many variations, and it is very rare for any confusion to result.

Punctuation

Punctuation presents much less of a problem, in that the official principle in Esperanto is that you may follow the punctuation customs of your native language. This means that, in particular, the use of the comma varies considerably depend-

ing on the native language of the writer.

By and large, commas are encouraged — contrary to present day trends in English. Many European languages follow the principle that all clauses are separated by commas. Exactly what is considered to be a clause varies according to the customs of the various languages. The common English teaching that you use a comma in order to indicate a brief pause in speech is not the usual principle in Esperanto.

Some beginners in Esperanto may wonder why such a magazine as *Monato* seems to use many superfluous commas, in contrast to, for example, *Revuo Esperanto*. A brief rule of thumb for those wishing to follow European customs is to place a comma before any word starting with *ki*, since statistically most separate clauses begin with such a word as *kiu*, *kiam*, *kie*, etc. However, this is by no means an infallible principle. Also many Esperantists place a comma before a descriptive set of words, which may make a strange impression on us. For example: *Tiel ili atingis la vojon, pavimitan per flavaj brikoj.*¹ You will find that some major Australian Esperantist writers, such as Trevor Steele, favour a frequent use of commas, while others, such as

your editor, tend to use commas in Esperanto rather sparsely.

This is a matter of style, and style, in Esperanto, tends to be much more free than in English.

Hyphens

Hyphens are used rather differently in Esperanto than in English. The primary uses are:

① To indicate an abbreviation of a common word, such as *d-ro* (*doktoro*), *s-ro* (*sinjoro*), *f-ino* (*fraŭlino*), even *e-o* (*Esperanto*).

② To indicate that some phrases are used with a special meaning. For example, *pli-malpli* (“more or less”), or that two terms are linked in a special way, for example *nigra-blanka* (black and white); *kredunekredu* (believe it or not)..

③ Sometimes, when a compound word might be read in two ways:

reprezenti (to represent)

re-prezenti (to present again).

*In English we often use hyphens where they are **not** used in Esperanto. For example:*

vice-president: *vicprezidanto*

chief-cook: *ĉefkuiristo*.

As a basic rule of thumb, any item considered in Esperanto to be a prefix is **not** followed by a hyphen.

“False Friends”

A number of words in Esperanto fall into the category of “false friends”. These are words which *look* like familiar Esperanto words, but mean something different. Among them:

¹ Taken from *Magiisto de Smeralda Urbo*, an Esperanto translation of the Russian version of *The Wonderful Wizard of Oz*.

kontroli which means “to keep an eye on something, to check through”. For example, an auditor *kontrolas* the accounts of an organisation.

“To control” = *regi* or *direkti*.

provi means “to try”. For example, *Mi provas la guston de la kuir-aĵo* “I try the taste of the cooking”; and *Ĉu vi provos sendi al ili mesaĝon?* “Will you try to send them a message?”

“To prove” = *pruvi*.

However, “try” in the legal sense of “put on trial” is **procesi**.

A “process” in the meaning of “a series of actions” is **procedo**.

registri does indeed include the meaning of the English word “to register”, but it is also used to mean “to record”, as by a tape cassette, vi-

deo cassette, or other apparatus. *Mi registras DVD-on* = “I record a DVD”

prezidanto is a “person who presides”, a “chairperson”. In contrast:

prezidento is a person elected to rule a country, the chief executive of a republic.

magistrato is a town council. A “magistrate” in the English sense is a **juĝanto**.

teko is a “briefcase” (nothing to do with the English word “take”).

konsilio is a Council, a formal group of people which manages an institution, makes legal decisions.

konsili is to give advice, which may or may not be followed, and which has no authoritative quality.

Bertilo Wennergren pri “devas ne”

el Plena manlibro de esperanta gramatiko

Devi + ne

Principe estas granda diferenco inter *ne devi* kaj *devi ne*. *Ne devi* logike signifas, ke mankas devo fari ion, ke regas libereco. *Devi* ne logike signifas, ke ekzistas devo eviti ion, ke mankas libereco. Tamen Zamenhof uzis *ne devi* kaj *devi ne* sendistinge. Normale li uzis *ne devi*, iafoje *devi ne*. La efektiva signifo estas tamen preskaŭ ĉiam “devi ne”:

• *Oni ne devas havi tro multe da konfido al si mem.*^[M.170] = *Oni devas ne havi tro da konfido al si*

mem.

- *Ŝi surmetis la ruĝajn ŝuojn – tion ŝi ja povis fari – sed tiam ŝi iris al la balo kaj komencis danci, kaj tion ŝi ne devis fari.*^[FA2.100] = ...*kaj tion ŝi devis ne fari.*
- *Pri gustoj oni disputi ne devas.*^[PE.2084] = *Pri gustoj oni devas ne disputi.*
- *Memoru bone, ke de la komenco ĝis la fino de tiu laboro, se ĝi daŭrus eĉ jarojn, vi ne devas paroli; la unua vorto, kiu eliros*

el viaj lipoj, frapos kiel mortiga ponardo la koron de viaj fratoj.
^[FA1.109] = ...vi devas ne paroli...

- *Mi **ne devas** agi kontraŭ mia konscienco.* ^[M.58] = *Mi devas ne agi kontraŭ mia konscienco.*
- *Lernolibron oni **devas ne** tralegi, sed tralerni.* ^[FE.31] La kontrasto inter *tralegi* kaj *sed tralerni* estas pli klara kun la logika vortordo *devi ne*.

La logikan signifon de *ne devi* Zamenhof normale esprimis per *ne bezoni*. Oni povas ankaŭ uzi *ne esti necese*:

- *Vi **ne bezonas** tiel rapidi.* ^[FA1.6]
= *Ne ekzistas devo por vi tiel rapidi.*
- *Kiu bone agas, timi **ne bezonas**.*
^[PE.972] = *Kiu bone agas, por tiu ne ekzistas devo timi.*
- ***Ne estas necese**, ke vi tien iru.* = *Ne ekzistas devo por vi tien iri.*

Ĉion ĉi kaŭzis verŝajne, ke *ne* kutime staras antaŭ la ĉefverbo. Precipe influis la simileco kun *ne povi*, kiu estas la plej kutima nea formo de tiu verbo. Ĉe *devi* la inversa signifo estas la plej kutima, sed Zamenhof elektis uzi la plej kutiman formon por la plej kutima signifo.

Normale oni ankoraŭ sekvas la

Zamenhofan uzadon de *ne devi*, sed multaj nun efektive uzas *ne devi* kaj *devi ne* laŭ iliaj logikaj signifoj. Tio povas iafaje eventuale esti konfuzon kaj miskomprenon.

En la parolo oni ofte distingas per akcentado. Se temas pri manko de devo, oni emfaze akcentas je *devi*. Alie oni akcentas alian vorton:

- *Vi **ne devas** iri tien.* Akcento je *devas*. = *Ne ekzistas devo por vi iri tien.*
- *Vi **ne devas** iri tien.* Akcento je *iri*. = *Vi devas ne iri tien.*

Referencoj

^{FA1} = *Fabeloj de Andersen*. Unua Parto. Tradukis el Germana traduko L. L. Zamenhof

^{FE} = La Ekzercaro en *Fundamento de Esperanto*.

^M = Orzeszko, Eliza: *Marta*. Tradukis L. L. Zamenhof.

^{PE} = Zamenhof, L. L.: *Proverbaro Esperanta*.

A conclusion similar to that of Wennergren is also given in M.C. Butler's textbook *Step by Step in Esperanto*. □



• deziras korespondi

Multaj esperantistoj de Tang-Shan-a Esperanto-Asocio volas havi korespondamikojn en diversaj landoj. Korespondantoj povos skribi al Tangshana Esperanto-Asocio, PO Box 3, Tangshan Hebei, 063000, Ĉinio. □



Korespondkurso Servo de AEA 2005

Hazel Green

La servo por vendi korespondajn kursojn, kaj gvidi studentojn tra la kursoj daŭras trankvile kaj ne tre aktive. Dum 2005, 16 homoj aĉetis 19 kursojn, el kiuj 15 estis kurso 1, Bonan Tagon.

Mi aranĝas kursgvidanton por ĉiu aĉetinto, sed ne ĉiu sendas ekzercojn al sia gvidanto. Kelkaj uzas la materialon kiel aldonon al ĉeesta kurso.

Oni povas sendi ekzercojn per retroŝtado aŭ per limakpoŝtado, sed al tiuj kiuj ŝatas uzi la interreton, mi ĉiam rekomendas lerni per unu el la interretaj kursoj.

Dankon al la kursgvidantoj, al Peter kiu preparas sonbendojn, kaj al Igor, kiu aranĝis vendadon de kursoj per la interreto. □

Via Redaktoro

deziras esprimi sian dankon al Svetislav Kanaĉki kaj Steve Pitney, kiuj bonvolis sendi la ekzemplerojn de *The Australian Esperantist* mankajn en nia arkivo. Ili nun legeblas en la retarkivo ĉe www.esperanto.org.au. —[db] □

Esperanta futbalteamo volas kvalifikiĝi por la Monda Pokalo en Sud-Afriko en 2010.

La iniciantoj de la teamo estas la artistoj Olof Olsson kaj Daniel Salomon, kiuj kunlaboras sub la nomo “La Loko”. Olsson kaj Salomon estis en Berlino en marto 2006 por promocii sian projekton.

“La Loko” uzas Esperanton en projektoj reflektantaj pri lingvo, kulturo, teritorio kaj ekonomio. Antaŭe ili surbendigis la unuan Esperantan sitkomon en la mondo kaj lanĉis la Esperantan rapidmanĝejojĉenon *Ovo*.

Per lanĉi Esperantan futbalteamon, ‘La Loko’ proponas al la ludantoj kaj la fervoruloj futbalon sen nacia ŝovinismo.

“La Loko” ĉeestos en Germanio

dum ĉi somera Monda Pokalo kaj lobios FIFA-n rekte, kaj ankaŭ ĝiajn anojn kaj ĝiajn asociojn.

Ĉi somere la Esperanta futbalteamo ludos maĉojn en Kopenhago (la 20-an de majo), Rejkjaviko (la 17-an de junio) kaj Sarajevo (la 12-an de aŭgusto).

“La Loko” provas nuntempe aranĝi maĉon en Berlino en julio.


Por rendezuoj kaj ceteraj informoj, bonvolu kontakti la informadestrinon de “La Loko” en Berlino, Johanna Domke je: johanna@laloko.org, aŭ +49 (0) 178 6066218.

<<http://www.laloko.org/>>

[el *Ret-info*] □



recenzas via redaktoro



Femina — revuo en esperanto, ne nur por virinoj

Redaktata de Perla Ari Martinelli. Abonprezo: 30 CHF (svisaj frankoj). Retadreso de la redakcio:

fem@esperantio.net;

de la administracio: If-koop@esperantio.net.

Takso: 🍷🍷🍷🍷

Ĉi tiu revuo estas nun en sia dua jaro, kaj tre bonaspekta kaj leginda ĝi estas. Enhavo de numero 5 (printempo 2006):

Mesaĝo 2006 de Feminina Esperanta Movado

Kion signifas esti virino? Kial ni bezonas feministojn?

Plu daŭras la batalo de Irakaninoj

Nigra Rozo luktis por la rajtoj de la homa digno. Kredi en Afriko signifas kredi en la virinoj.

Ni helpu la teron kuraci siajn vundojn

Esti flor' kaj frukto kune — la nova modo nomiĝas kikojo

Isis, Maria, Sayedaj — en Egiptio la dieco estas ina

La “ekstra aldono”

Per la aŭtobuso

La anomalia konkurso

Miss Esperantio

Abomeninda tradicio

26 grandformataj paĝoj,

abunde ilustritaj.

La Feminisma Esperanta Movado priskribas sin tiel:

Feminismo ne celas deklari la interseksan militon, sed malfermi rediskuton pri kelkaj arkaikaj roloj, ekde tio kion nia socio konsideras vira kaj virina. Ne rezultante el natura tendenco, tiuj roloj estas so-

ciaj konstruoj por fortigi la artefaritan disigon inter viroj kaj virinoj, por profundigi distancon kreitan por konservi malekvilibran kaj maljustan povostrukturon, kiu verdire punas ambaŭ seksojn. Dum la lasta jarcento, tiaj konstruoj, kiuj daŭris jarmilojn, frakasiĝis. La virinoj, en sia strebo redifini sin, devigis la viron fari same.

Feminisma Esperanto Movado aliĝas al la supraj konceptoj, inspiritaj de gravaj aktivulinoj kiel Lucia Etxebarria, kaj proponas ilin kiel diskutbazon kaj ideologian platformon.

Konsekvence FEM:

a) dekomence akceptas la kunlaboron de viroj;

b) taksas prioritataj la subtenon al la esperantlingvaj senedzaj patrinoj, la lukton kontraŭ generacia diskriminacio inter virinoj, la apogon al neperfortaj vivostiloj;

c) akceptas kiel parton de tiaj prioritatoj la konscion ke respons-ema regado de la naturmedio ne eblas sen spaco por demokratio, kaj demokratio ne eblas sen plena partopreno de virinoj;


d) denuncis kaj denuncas la dis-kriminacion kontraŭ virinoj, rimarkeblan en la misproporcia reprezento de virinoj en la gvidaj or-
ganoj de Esperantio, kun pozitiva escepto en la Esperanta Civito;

e) konsideras la batalon kontraŭ gramatika genrismo aŭ la “ri”-manion¹ kiel fenomenojn margenajn

kaj margenigajn, kiuj certgrade malhelpas la atenton pri la realaj problemoj de la virina kondiĉo en Esperantio;

f) emfazas la bezonon engaĝi sin favore al la agnosko pri milito kiel socia krimo, same kiel okazis pri sklaveco, por ke ĉiuj viirinoj donu al pacifismo la klaran signifon de totala militrifuzo. □

¹ “Ri-manio”: diversaj personoj emfaze proponas ke oni uzu novan pronomon *ri* kiu estas ne-seksindika, do signifas “ŝi” aŭ “li” laŭ la kunteksto. — [db]



• skribas la legantoj

Skribas Franciska Toubale:

Ĉu esti aŭ ne esti Profesia?

La vorto “profesia” fariĝis tre grava en la Aŭstralia Esperanto Asocio lasttempe. Ĝi estas preskaŭ magia. Ĉiu problemo solveblas per peto de opinio, konsilo de profesiulo, prefere ne membro de la asocio. Ĉu vere? Tio tre mirigas min.

Esperanto instruis min esti singardema. Ne estas maloftaĵo ke fama lingvisto kritikis Esperanton en tiu maniero ke esperantisto tuj komprenas ke tiu fakulo neniam studis la universalan lingvon. Sed pro lia titolo, lia opinio fariĝas grava, do pli danĝera. En Francujo eĉ estas servo pri rebato, estrata de Henri Masson. Se tiuj profesiuloj povas erare juĝi Esperanton pro tio ke ilia opinio baziĝas sur sentoj ne sur faktoj, ĉu ili ne povas erari an-

kaŭ pri aliaj temoj?

La tiel nomataj spertuloj ne ŝatas dividi sian sperton kun la laikoj. Ili riskas perdi kaj rimedon por riĉiĝi kaj potencon. Kiel Claude Piron raportis en “la communication linguistique” (Lingvistika komunikado), necesis du jarcentoj da batalo por ke finfine la arabaj ciferoj anstataŭu la romanajn, donante la kapablon al iu ajn kalkuli por si mem.


Ludoviko Lazaro Zamenhof donacis al la homaro rimedon por ke ĉiu individuo, kiu lernas la lingvon, povu uzi ĝin por persona evoluo al pli klera homo, ne por riĉiĝi aŭ fariĝi pli potenca. Mi eĉ ofte konstatis tiun pozitivan evoluon. Sed necesas fidi la homojn, akcepti ke ĉiu el ni ricevis iom da racio, inteligento kaj scivolemo, almenaŭ sufiĉan kvanton por organizi, decidi, trakti la prob-

lemojn kaj rekoni siajn erarojn

Dum kongresoj mi aŭdis ke la asocio trairas krizon, ke la membraro ne kreskas. Ĉu asocio, kiu ne donas al siaj membroj la oportunon akiri novajn spertojn estas alloga?

Laŭ mi, ne. La membroj bezonas defion, bazitan sur fidon kaj subtenon de la aliaj membroj, por kleriĝi.

Ni ne kopiu la strukturojn de la ekstera mondo, la socian hierarkion ktp. Anstataŭ “profesia”, mi ŝatus ke la vorto “ĝojo” pli ofte eniru nian asocion: ĝojo pro superado de malfacilaĵo, ĝojo de kunesto, ĝojo pro sento ke la asocio provizas kadron por eligi la plejbonon el ĉiuj el siaj membroj. □



☞ • **interrete**

Pli da esperantolingvaj verkoj troveblaj en la Reto

Vjaĉeslavo Rybakov: *Gravitavio «Carido»* El la rusa tradukis Jurij Finkel. Ĉe:

<http://www.esperanto.mv.ru/Gravitavio/index.html>. Sciencfikcia romano.

Etelo Liliano Vojniĉ: *Ojstro*. Ĉe <http://www.esperanto.mv.ru/Ojstro/>. Tragedia romano.

L. L. Zamenhof: *Fundamenta Krestomatio*. Ĉe: <http://www.gutenberg.org/etext/8224>

Jakub Arbes: *Rakontoj*. Ĉe: <http://www.gutenberg.org/etext/18178>

Aleksandr Volkov: *Magiisto de Smeralda Urbo*. Ĉe: <http://esperanto.noka.ru/magiisto.html>. Esperantolingva traduko de la rusa reverko de *La mirinda*

sorĉisto de Oz. La romano sekvas la ĝeneralan tekston de la originalo de Baum, sed multe varias la detaloj; kaj enestas ekstraj epizodoj verkitaj de Volkov..

Peter Peneter (Gaston Waringhien): *Sekretaj sonetoj*. Ĉe: <http://members.at.infoseek.co.jp/peneter/peter/mastrumo.htm> Fama “porno-grafia” poemkolekto.

Karel Havlicek Borovsky: La bapto de Caro Vladimir, tr. Tomas Pumpr. Ĉe: <http://www.rano.org/vladimir>

Jakov Perelman: *Interplanedaj vojaĝoj*. Laŭdire la unua tiutema sciencpopulariga libro en la mondo. (Eld. 1915!) Ĉe: <http://www.fw.hu/eventoj/steb/fiziko/index-fiziko.htm>

□

Nova-malnova paĝaro por informado pri Esperanto

aperis por esperantistoj. *Reta Informado-Centro* (RIC), projekto kiu dum la lastaj monatoj “dormis”, reaperas en nova stilo kaj kun nova vizaĝo. Danke al kunlaboro de UEA kun E@I (faka sekcio de TEJO) estis kreita nova

hejmpaĝo por la centro, kiu celas esti “reta stokejo” de informiloj pri Esperanto.

La paĝaro proponas sian spacon por jenaj tipoj de materialoj: informiloj, fotoj, bildoj, videoj kaj retligiloj (Laŭ la bezono estos kreataj pliaj submenuoj por ili.).

Eblas ankaŭ diskuti la temojn de informado en la Diskutejo — en kiu eblas krei forumojn laŭteme kaj laŭbezone.

Plej grava trajto de la paĝaro tamen estas ebligigo de enmetado de informiloj fare de la paĝarvizitantoj mem (t.n. “Alŝutejo”) — tiel eblas atingi daŭran pliriĉigadon de la paĝaro per novaj informiloj. Baldaŭ aldoniĝos ankaŭ la dokumentoj kaj informiloj de UEA.

Ankaŭ viaj informiloj estas bonvenaj en la nova paĝaro:

www.informado.net

(Noto de via redaktoro: mi vizitis tiun retpaĝon, kaj trovis ke ĝi vere estas tre valora teko da materialoj utilaj priesperantaj. — [B])

Edukado.net

Ankaŭ la retpaĝoj de edukado.net estas multe reviziitaj kaj plimultigitaj. Do ni rekomendas ke vi vizitu krome www.edukado.net, por trovi la abundon tie. □

La origino kaj evoluo de lingveco de Brian Fox

Orauta antaŭ 50 jaroj

Antaŭ kvindek jaroj mi instruis en la fora nordo de Novzelando. Unu el la knabinoj en mia klaso ĉiutage veturis el eta vilaĝo, *Orauta*, kie ŝi loĝis kun sia avino. La avino parolis nur la maorian lingvon, sed mia knabino bone regis ambaŭ lingvojn. Efektive ŝi estis la plej bona kreiva verkisto en la angla en mia klaso.

Ja ekzistis elementa lernejo en *Orauta*, kaj la interesa parto de tio estas, ke ties lernejestro estis klerulo pri la historio de la nordo, do li kondukis esploron pri la loĝantaro de *Orauta*. Kiel vi scias, tradiciaj

maorioj interesiĝas pri sia *whakapapa*, t.e. genealogio, do por li estis facile, kun helpo, fari familian “ar-bon” por ĉiuj en la vilaĝo.

La vilaĝa lingvo estis la maoria sed kio surprizis lin estas ke la plimulto de la prauloj de la vilaĝanoj devenis el nemaoriaj gentoj: eksmaristoj, balenistoj, fuĝintoj el la punkolonioj en Aŭstralio, eskapintaj sklavoj el usona ŝipo, pekintaj misiistoj, elfor-pagitoj, britaj aristokratoj. Sed la lingvo kaj kulturo en *Orauta* restis maoriaj.

Daŭro de lingvoj

Kiel ekspliki tion? Antropologoj

scias ke kulturo temas pri la maniero de vivo de homgrupo; ĝi daŭras trans generacioj, kaj ŝanĝiĝas nur malrapide. Se enmigrintoj aliĝas al vilaĝo, kvazaŭ unuope, ili vivas en la loka kulturo, kaj iliaj idoj adoptas la lokajn kulturon kaj lingvon.

Ni povas vidi tion laŭ malgranda skalo pri setlantoj el Anglio. En 1788 kiam la unuaj koloniistoj veturis al Sidnejo, Londonanoj prononcis *dance* [dæns]¹, *plant* [plænt], *branch* [brænc̥]; kaj Aŭstralianoj daŭrigas tion, malgraŭ multaj postaj enmigrintoj.

Sed Londono ŝanĝis sian prononcon inter 1800 kaj 1810 pro amuza okazado en la muzikhaloj. Do, kiam anglaj koloniistoj setlis en Sudafriko en 1820, ili prononcis la vortojn *dance* [dans], *plant* [plant], *branch* [branĉ]; kaj Sudafriko ankoraŭ faras tion malgraŭ enmigrado el ĉie.

En la tempo de la Traktato de Waitangi 1840 la ĝenerala lingvo en Novzelando estis la maoria kaj restis tia ĝis la 1820-jaroj, kiam okazis inundo da enmigrintoj, kaj Novzelando fariĝis dulingva lando.

Normanda Anglio

La situacio similis al Anglio post la Normanda Konkero en 1066, kie la reĝo kaj la reganta kasto parolis la francan kaj la kamparanoj uzis la anglan. La Konkero eliminis la anglajn regantojn. Supra kasto emas konservi formalan lingvon, kaj la-

borista kasto emas akcepti familiaran lingvon. Do natura ŝanĝiĝo en la angla okazis sen la kutima bremsa.

Ni povas lerni multon pri la rilatoj inter la normandoj kaj la angloj per studo de la rezulta angla lingvo. Vortoj pri regado kaj juĝado eĉ hodiaŭ estas el la franca: *accuse*, *arrest*, *indict*, *court*, *penalty*, *prison*, *torture*, *execute*.

La bestoj havas anglan nomon: *ox*, *sheep*, *pig*, *deer*; kaj la viando havas francan nomon: *beef*, *mutton*, *pork*, *venison*. El tio ni scias kiuj laboris en la kampoj, kaj kiuj festis ĉe la bankedoj.

Se oni ricevis anglan nomon, *John*, oni ankaŭ gajnis francan *Jack* = *Jacques*. Kaj se francan *Henry*, la anglan *Harry*; francan *Richard*, anglan *Dick*. Formala kaj familiara.

Notindas ke simila duoblo okazas en Novzelando kun *Steven/Tipene*, *John/Hone*, *George/Hori*, *Susan/Huhana*.

La britkelta lingvo

La saksoj, la engloj, kaj la norsoj² invadis Brition inter 450 kaj 900. Tiuj triboj intermilitis sed ankaŭ intermiksiĝis, kaj hodiaŭ la angla lingvo havas vortojn el ĉiu de tiuj dialektoj. Ekzemple *shirt* el la saksa, *skirt* el la norsa, *hat* el la engla. Por matenmanĝo: *milk* el la saksa, *egg* el la norsa, *cheese* el la engla. La angla por “esti” estas kunfandaĵo de *be*, *am*, *was*. La mikso de

¹ Uzata por prononcindikoj estas la Internacia Fonetika Alfabeto (IPA) inter rektaj krampoj: [kaj]. — [db]

² “Norduloj”, t.e. homoj el Skandinavio, precipe Norvegio. — [db]

vortoj indikas intiman rilaton inter tiuj gentoj, ĉu amika ĉu milita.

Sed kio okazis pri la britkelta lingvo? Tre malmultaj britkeltaj vortoj eniris la anglan: *crag* de *craig* por roko; *dad* de *tad* por patro; *avon* de *afon* por rivero; la sufikso *-combe* de *cum* por valo.

Tiu dezerto de vortoj el la britkelta informas multe pri la rilatoj inter la angloj kaj la keltoj. Ni povas diveni ke la keltoj suferis pro subpremo kaj pelado al Kornvalo, Kimrio kaj Kumbrio.

Vortoj en Novzelando

Troviĝas multaj anglaj vortoj en la maoria, kaj multaj maoriaj vortoj en la novzelandano uzo de la angla¹. Ekzemple: *kumara*, *mana*, *hangi*; la nomoj de birdoj, plantoj kaj lagoj: *tui*, *kauri*, *Taupo*; vortoj en leĝoj: *whanau*, *tangi*, *raupatu*; slangaj esprimoj: *hoot*, *boohai*, *goory*; miksvortoj: *maoridom*, *half-pai*, *waka-jumper*; ŝercaj esprimoj: *sandfly haka*, *Te Ware-whare*, *electric puha*.

El tiu intermikso de vortoj, ni povas supozi ke, malgraŭ la novzelandaj militoj kaj ŝtelado de maoria tero, ekzistis intima rilato inter la du ĉefaj gentoj en Novzelando.

John Harré en sia doktoreca verko² asertas ke, dum pli ol cent jaroj, norme kvarono el maorioj geedziĝas kun eŭropidoj, kaj ĉirkaŭ dekono el eŭropidoj geedziĝas kun maorioj.

¹. Troveblas en *The Macquarie Dictionary* de Aŭstralio.

². Harré: *Maori-Pakeha Mixed Marriages*.

Tio influis la interŝanĝigon de la kulturoj kaj lingvoj.

Interŝanĝo de vortoj

Mi plenkreskis en Sudafriko. Tie la du eŭropidaj gentoj intermiksiĝas socie kaj lingve. Troviĝas multaj afrikansaj vortoj en la angla. Ekzemple: *trek*, *wildebeest*, *apartheid*. Pluraj afrikansaj vortoj eĉ migris al Novzelando, ekzemple: *bush*, *scoff*, *spiel*. Tio sugestas ke, malgraŭ la sudafrikaj militoj inter britoj kaj buroj, la rilato inter ili permesis intermikson de la gentoj.

Sed kiam ni esploras la eŭropajn kaj bantuajn lingvojn en Sudafriko ni vidas malsaman situacion. Malgraŭ tricent jaroj da kunekzisto, troviĝas malmultaj bantuaj vortoj en la angla aŭ afrikansa lingvoj. Estas kelkaj nomoj por lokoj kaj riveroj, sed plej parte tiuj havas eŭropajn nomojn. Eĉ la vorto Soweto estas anglalingva, kaj signifas *South West Township*. El tio ni povus supozi, se ni ne jam sciis, ke la rilato inter blankuloj kaj nigruloj ne estis intima, sed montras historion de superuloj kaj subuloj.

La angloj en Hindio

La angloj prenis partojn de Hindio ekde 1750, sed neniel povis nur proprapene regi tiun landon, tiom vastan kaj kun tiom granda enloĝantaro. Ili bezonis helpon de hindoj mem. Por tio oni uzis la klasikajn rimedojn de antaŭaj imperioj: disigu kaj regu; laŭ religio, laŭ provinco, laŭ kasto, laŭ etno, laŭ edukado, laŭ riĉeco.

La Britaj regantoj dungis hind-

ajn soldatojn, policianojn, ŝtatoficistojn, juĝistojn, ktp. Tiu politiko, dum ducent jaroj, nepre bezonis interŝanĝon de vortoj. La angla havas multajn vortojn el la hindaj lingvoj: *bungalow*, *shampoo*, *pyjamas*, *jungle*, *dinghy*. Tio indikas ke la ordinarnaj britoj traktis hindojn kun respekto kaj egaleco.

Aldonaj vortoj

La angla havas kvincent mil vortojn, pli multajn ol iu alia lingvo. Ĉirkaŭ duono de tiuj vortoj venis el aliaj lingvoj. Oni ne povas facile esprimi sin en la angla sen utiligo de tiuj vortoj: araba *algebra*, japana *tsunami*, ĉina *typhoon*, nederlanda *yacht*, ĉeĥa *robot*, samoa *tattoo*, hispana *barbecue*, germana *kindergarten*.

Ĉi tiu adopto de vortoj el aliaj lingvoj certe ne mortigis la anglan lingvon, ne eĉ difektis ĝin; ĝi daŭre kreskas.

Tiu fenomeno ankaŭ okazas en aliaj lingvoj. Germanoj ŝercas ke oni ne povas legi germanan ĵurnalon sen angla vortaro en la mano. Sed antaŭ dek jaroj la franca parlamento dekretis ke francoj ne rajtas uzi anglajn vortojn en francaj frazoj. La franca popolo saĝe ignoras la leĝon, kaj ankoraŭ parolas pri *le jeans*, *le specs*, *le weekend*. Kiel angloj diras: *C'est la vie!*

Lingvaj elementoj

Ĝis nun mi komentas nur pri vortoj. Tamen gramatikaj eroj ankaŭ ŝanĝiĝas sed malpli rapide. Kiam la ĝermanaj triboj invadis Brition, la finaĵo por pluralo estis *-en*,

kiel ĝi ankoraŭ estas en *children*, *oxen*, *brethren*. Pro la influo de la normandfranca, tio ŝanĝiĝis al la nuntempa finaĵo *-s*, kiel en: *kids*, *cows*, *brothers*.

En la malnovangla ekzistis akordo inter substantivo kaj adjektivo, (same kiel en aliaj eŭropaj lingvoj, inkluzive de Esperanto), sed tio velkis kaj ankoraŭ restas en nur du lokoj en la angla: *this book/these books*; kaj *that chair/those chairs*.

La germana kaj nederlanda lingvoj havas regulojn pri la pozicio de la verbo. Ankaŭ la angla havis tion, sed ĝi nun regas nur en fiksjaj diraĵoj: “*Never have I been so rudely insulted*”. Sed oni ne plu diras: “*Never went she to town*”.

La sama sorto falis al genro ĉar la ĝermanaj genroj en la angla konfliktis kun la latinidaj genroj en la franca. Simile mortis la du formoj de adjektivo: 1. antaŭ substantivo, kaj: 2. post “esti”. En la nederlanda: *Het witte huis/Het huis is wit*. Parta ekzemplo en la angla estus: *The lone sailor/The sailor is alone*.

Ŝanĝiĝoj en sintakso

La frua angla uzis kazojn sen vortordo sed, laŭ esploro de Otto Jespersen¹, dum pli ol jarmilo la angla daŭre moviĝas al vortordo de: subjekto-verbo-objekto, po kvin elementoj de frazoj ĉiun jarcenton. En antaŭaj romanoj oni ankoraŭ legas: “*Come in,*” *said she*. La lastatempaj uzas: *She said, “Come in”*.

¹ Jespersen: *Modern English Grammar on Historical Principles*.

Demandoj ne konformas al S-V-O, ekzemple: *Is he here?* kaj iuj subpropozicioj, ekzemple: *The book that I read.*

La stimulo por ĉiuj tiuj ŝanĝiĝoj estas kompreno inter la parolanto kaj la aŭskultanto. Tio havas pli grandan motivon kiam la du personoj parolas apartajn lingvojn. Ĝi estas la kialo por la piĝina procedo de lingva kreado. La angla lingvo spertis mildan specon de tiu piĝina procedo kun la saksa, engla, kaj norsa lingvoj, sed pli gravan piĝiniĝon inter la malnovangla kaj la normand-franca. Se piĝina lingvo fariĝas la ĉiutaga lingvo de gento, oni nomas ĝin “kreola lingvo”. Tio okazis al la angla lingvo.

Piĝinaj lingvoj

La plej fama piĝina lingvo estis tiu inter soldatoj el landoj en la Krucmilitoj. Pro neceso por kompreni ili kreis lingvon kiun oni tiutempe nomis *Sabir*. Poste ĝi renomiĝis *Lingŭa Franka*. Ĝi estas tre interesa lingvo. Ĝi uzis prepoziciojn eĉ por indiki la “akuzativan” objekton. Ekzempla frazo el *Sabir*: *Mi comer per pan*. Laŭvorte tio signifas: *Mi manĝas al pano*. Aŭ se vi preferas: *Mi manĝas na pano*.

Lingvistoj nun kredas ke la piĝinaj lingvoj de la lastaj du-tri jarcentoj estas nur “releksikigo” aŭ “revortigo” de la vortstoko de tiu *Sabir*. Kiam la hispanaj esploristoj parolis kun popoloj en Afriko, ili enmetis hispanajn vortojn. Unu fama piĝina vorto estas *pikanini* el la hispana *pequeño niño*, por “eta infano”.

Poste la angloj anstataŭigis siajn vortojn, ekzemple: *bosboi* por “estro” el *boss* kaj *boy*. Ĉi tiu nova teorio supozas ke ĉiu piĝina lingvo restas baze sama sed la vortoj grade renoviĝas per aldonoj kaj anstataŭiĝoj.

Lingva ŝanĝado

Tiu fenomeno ankaŭ okazas en etnaj lingvoj, sed malpli radikale, kaj malpli rapide. Jen ekzemploj el la mezangla verko de Geoffrey Chaucer en 1400¹: tiutempe *cleped* nuntempe *named*; tiam *foweles* nun *birds*; pasintecce *eke* nun *also*; antaŭe *couthe* nun *well known*. Oni kalkulas ke post jarmilo ĉiu lingvo retenas 80 elcentojn de sia vortstoko, sed ofte en ŝanĝita formo.

En la gramatiko de la novmelanezia, la kreola lingvo de Papuo, estas kelkaj interesaj eroj, novaj gramatikaj ideoj. Ekzemple, ĉiuj transitivaj verboj havas la sufikson “*im*”. Jen ilustraĵoj: *Mi luk* = mi rigardas; *mi lukim yu bihain* = mi vidos vin poste. *Yū raus* = vi eliru; *mi rausim yu* = mi elpelos vin.

Difino de lingvo

Antaŭ ol ni povas decidi kiam generiĝis la unua lingvo, ni devas decidi pri difino de homa lingvo. Ĝi ne estas nur “organizita bruo” kaj ne estas nura “komunikilo”. Per lingvo oni povas esprimi tute novan frazon, el kiu la aŭskultantoj povas plene kompreni vian penson. Jen ekzemplo: “*Mia plumo kuŝas sur la tablo de Jackie.*” Eĉ se iu jam diris

¹ Chaucer: *Prologue of the Tales of Canterbury*.

vere saman frazon, ne estas pro tio ke vi komprenas mian frazon; sed estas pro via kompreno de la konceptoj en la vortoj, kaj la sintakso de la lingvo.

Mia frazo havas vortojn kaj strukturon. En ĉiuj lingvoj troviĝas du specoj de vortoj: 1. enhavo-vortoj, kaj 2. funkci-vortoj. En mia frazo: *plumo*, *kuŝas*, *tablo*, *Jackie*, estas enhavo-vortoj. Ili havas signifon en si mem. La aliaj vortoj: *mia*, *sur*, *la*, *de*, montras la rilaton inter la aliaj vortoj. “*La*” signifas ke ni jam scias pri tiu tablo; “*sur*” montras la situacion rilaton inter “*plumo*” kaj “*tablo*”; “*de*” indikas la apartenon de la “*tablo*” al “*Jackie*”; “*mia*” kunigas “*la de mi*” (plumo).

Elementoj de lingvo

Mi devas kondiĉi tiun aserton pri du specoj de vortoj, ĉar en iuj lingvoj la enhava kaj la funkcia elementoj povas ekzisti kiel partoj de unu “vorto”; sed la principo restas la sama. En la frazo: *Li vagis hejmen*, la sufikso “-en” funkcias simile kiel la prepozicio “al”; t.e. la direkto de la “*vago*”.

Ni trovas aliajn komunajn rudimentojn en la lingvoj de la mondo. Parolado havas kaj konsonantojn kaj vokalojn. La plejmulto da lingvoj havas ĉirkaŭ dudek konsonantojn; Esperanto havas dudek du. La nombro de vokaloj plus diftongoj pli varias. Sed pli gravas aliaj malsamaj pri vokaloj. La japana kaj maoria diferencigas inter longaj kaj kurtaj vokaloj; sed la hispana kaj kimra, ne. La ĉina kaj birma dife-

rencigas vokalojn per tonoj; sed la rusa kaj korea, ne.

Tamen ĉiu homo kapablas facile lerni iun ajn lingvon, se denaske, kaj iun alian lingvon per studo. Noam Chomsky demonstras ke tiu homa kapablo por lerni kaj uzi lingvon estas integra kapablo de la homa cerbo¹.

Aliaj karakteroj

En ĉi diskuto pri fonemoj ni preteratentas signan lingvon. En Novzelando nun estas tri oficialaj lingvoj: angla, maoria, kaj signa; tio estas la novzelandanda signa lingvo. Ĉiuj el la tri havas apartajn gramatikojn, kiuj organizas en malsamaj manieroj. Malgraŭ tio, ĉiuj diferencigas inter enhavo-partoj kaj funkci-partoj.

Plie, la du parolaj lingvoj ankaŭ uzas korpan lingvon. Observu personon kiu parolas per telefono kaj vi trovos ke la manoj, la vizaĝo, kaj la kapo instinkte faras sian rolon en la mesaĝo.

Alia trajto de lingvo estas ke infanoj relative facile lernas legi el nigra-blanka simbolaro sur papero. Multaj kvarjaruloj lernas legi kaj preskaŭ ĉiuj kvinjaruloj sukcese komencas regi la arton. Tio sugestas ke ie en nia evolua pasinteco homoj prilaboris la lertecon por diveni signojn kaj simbolojn en la etoso de lingva komunikado.

La moviĝo de kapo supren kaj malsupren estas universala por

¹ Chomsky: *Transformational Generative Grammar*.

“jes”; kaj la turno de kapo dekstren kaj maldekstren estas tutmonda por “ne”. Kaj la leviĝo de la ŝultroj ĉie signifas “Mi ne scias”.

Kiam generiĝis lingvo

Por solvi kiam lingvo ekekestis, ni unue devas decidi kiuj homoj prilaboris ĝin dum la multaj jarmiloj. Ne estis reĝoj, estroj de registaroj, episkopoj, ĉefoj de industrio, profesoroj en universitatoj, aŭ la verkistoj de gramatiklibroj.

Memoru ke skribado kaj legado estas relative moderna rimedo, eble kvarmil jaraĝa; kaj universala ebleco legi estas tre moderna, de cent jaroj, kaj ne en ĉiuj landoj, nek ĉiuj lingvoj.

Lingvo evoluis en la streboj por komuniki kaj kompreni fare de dek-mil generacioj de nelegipovaj kavernuloj, sovaĝaj triboj, ĉaskolektistoj, ĝardenistoj, akvoportantoj, brutpelistoj, sklavoj, vilaĝanoj, laboristoj, soldatoj, ŝtelistoj, pastroj, esploristoj, dommastrinoj.

Lingvo estas la ido de demokrata procedo.

Kleruloj pri antropologio, arkeologio, kaj lingvistiko taksas ke la aĝo de lingvo estas 200 mil jaroj; t.e. lingvo kiel ni difinis ĝin, kun gramatiko kaj sintakso de enhavopartoj kaj funkciopartoj, kaj kun vortstoko.

Kulturo en frua homo

Neandertaloj kaj postaj homoj kreis kompleksajn ilojn el ŝtono kio sugestas ke ilia kulturo bezonis instruadon por transdoni la lertecon.

Neandertaloj enterigis siajn

mortintojn kun floroj. La poleno kiun oni trovas tie estas aparte el plantoj kiujn oni uzas por medikamento. Ili ornamis la mortinton per okro. En la tombon oni enmetis ostojn de cervo, uro, mamuto; supozeble kun ties viando. Tio sugestas kulturon kiu uzis lingvon.

La loĝejoj estis sufiĉe kompleksaj por ke la laboro por konstrui necesigis kunlaboradon, kaj tio necesigis komunikadon.

En la homa skeleto estas U-forma osto ĉe la bazo de la lango. En simioj tiu hioida osto estas pli alta en la kolo ol en homoj. Ankaŭ en pongoj el la *Pongidae*: ĉimpanzo, gorilo, orangutano, ĝi estas pli alta.

La malalteco de la hioida osto en homoj tenas la langon en maniero kiu permesas tian movon necesan por parolado. Pongoj kiuj regas signan lingvon tamen ne povas prononci vortojn kiel faras homoj.

Arkeologoj trovas en sia studo de skeletoj ke tiu hioida osto grade malaltiĝis en la kolo antaŭ 200 mil jaroj. Do oni konkludas ke neandertala kaj kromanĵona homoj povis paroli iom simile kiel parolas modernaj homoj.

La cerbo kaj lingvo

La cerbo de homoj havas du regionojn kiuj komandas nian uzon de lingvo. La “*Wernicke*” regiono necesas por kompreno de vortstoko; kaj la “*Broca*” regiono por produkto de sintakso. (Tio estas simpligo, sed sufiĉas por ĉi tio).

Ambaŭ regionoj apudas la maldekstran flankon de la kranio. Post

zorga studado de la interno de kranioj el arkeologio, oni taksas ke la *Wernicke* ekzistas de ĉirkaŭ miliono da jaroj, kaj la *Broca* de ĉirkaŭ 200 mil jaroj. Ja okazas argumentado pri tio, sed la plimulto tiel opinias.

Oni scias ke malfruaj homoj, tio estas *Homo sapiens* kaj *Homo neanderthalensis*, posedis ambaŭ regionojn. Verŝajne tiu laste trovita *Homo floresiensis* ankaŭ posedis ilin. Pro tio ni kalkulas ke tiuj tri specioj de *Homo* uzis lingvon, kiel ni difinis ĝin.

Oni diras ke dum la epoko de *Homo erectus* la *Wernicke* ja ekzistis. Kaj oni konjektas ke la *Broca* evoluis dum ties lastaj jaroj. Sekve, vera homa lingvo komenciĝis dum la transiro de *Homo erectus* al la pli modernaj specioj de *Homo*.

La antaŭaĵo de lingvo

Do, ĉu *Homo erectus* povis paroli kaj komuniki? Ni devas fari distingon inter “*lingvo*” laŭ nia difino, kaj “*paroli*” aŭ “*komuniki*”. Oni nun kredas ke ili povis komuniki per

vortoj kaj signoj, sed sen sintakso. Do iliaj mesaĝo kaj kompreno ne portis detalojn kaj nuancojn. Tio nomiĝas “*antaŭlingvo*”.

Post la transiro al vera lingvo, frua uzado estus per simplaj frazoj: *Plumo kun tablo*, kun sufiĉaj enhavo-vortoj kaj kun kelkaj funkcipartoj. Lingvoj facile aldonas substantivojn, verbojn, kaj adjektivojn sed ne facile adoptas novajn prepoziciojn aŭ subjunkciojn.

Esperanto facile aldonis: *sputniko*, *nuklea*, *tapi*, *aviadile*. Sed novaj prepozicioj, ekzemple: “*far*”, “*cis*”, “*na*” renkontas grandan reziston. Mi supozas ke tio spegulas la tempon de transiro el *antaŭlingvo* al vera lingvo, kiam la vortstoko de enhavo-vortoj jam estis granda sed la funkci-vortoj devis batali por ekzisti per la *Broca* regiono de la cerbo.

Do, mia dulingva knabino en vilaĝo Orauta estas la heredanto de miliono da jaroj da lingva evoluo. □

Estas preta la jam antaŭanoncita filmo Gerda Malaperis!

Ĝi estas frukto de longa laboro, lanĉita en la pasinta jaro kaj ĵus finita.

La filmo estas farita speciale por la esperantistoj tutmonde. Nia skipo kredas, ke tiu filmo estas grava ne nur por la lernantoj, sed ankaŭ por ĉiuj ni, ĉar ĝi ekas novan eraon pri komunikado en Esperantujo.

En tiu ĉi jaro ni fondis la filman entreprenon “Filmoj Imagu” kies celo estas produkti bonajn filmojn en Esperanto, ĉar mankas ja tiaj. La filmon *Gerda Malaperis* ni realigis pene, proprapoŝe kaj kun grava helpo de kelkaj afablaj esperantistoj kiuj apogis morale kaj finance nian projekton. Ni invitas vin esti partoprenanto en tiu laboro. Ni invitas vin antaŭaĉeti almenaŭ unu ekzempleron de la filmo. Ĝi estas produktita en la formato DVD.

Por koni nian laboron vizitu: <http://www.imagufilmo.org>

[Ret-info]

Vintra Esperanto-Lernejo en Adelajdo 3-4 junio 2006

de Zbigniew Wybraniec

La Vintra Esperanto-Lernejo organizita en Sudŭstralio por la dua fojo dum la sama nombro da jaroj sukcesis grandioze. Igor kaj Miranda, altvalora havaĵo de Aŭstralia Esperanto Asocio, gvidis siajn klasojn kun spektakaj rezultoj. Frato de Miranda, Andrew, montris ke lia Esperanto vere komencas iĝi jam tre bona, eĉ kvankam iom post la paŝoj de liaj patrino kaj fratino.

Pluraj genovuloj en vasta gamo da aĝdiferencoj, komencante per plurnombro da junaj novalvenintoj, finis la kurson kun vere mireginda sukceso, kiam ni konsideras la nombron da studhoroj.

Pluraj junaj koreaj gestudentoj de la Angla lingvo kune kun unu ĉinino kaj unu italo komencis lerni Esperanton en Aŭstralio. Akorde kun kion ili mem diras, ili firme decidis daŭrigi plu siajn studojn de Esperanto kaj aliĝi al la movado post reveni al siaj respektivaj landoj. Se tio ĉi daŭros samtiel, Sud-aŭstralio ŝajnas sendi signalon al la Suda Hemisfero ke Aŭstralio povas estiĝi inter gravaj vojmontraj lumturoj de la lumo de l'espero al la Esperanto-movado en tiu ĉi geografia regiono.

Trevor Steele, kiel kutime brila en sia fakokampo, gvidis la Trian

Nivelon de Esperanto-Kurso kaj Laboratorion de Traduka Ekzercado. Bob Felby, kaj lia bona edzino Audrey, Margaret Furness, Max Wearing, ĉiuj aldonis sian brikon por konstrui pli bonan sekvontecon en evoluigado de sana Esperanto movado en Aŭstralio. Ĉiuj havis ion por aldoni al la varieco kaj la neforgesebla etoso. Gordon Coleman, kiu provizis la renkontejon en sia lernejo, kie li ankaŭ instruas Esperanton, faris ĉion kion li povis por fari la eventon ĝuste tiel bona kia ĝi estis.

Mi povas diri ke tio ĉi estis inter la plej bonaj eventoj, kiujn mi partoprenis jam de longa tempo. Igor kaj Miranda pruvis ke ili ne malŝparas siajn ŝviton kaj penojn partoprenante en la Universitata Kurso por Instruistoj de Esperanto ĉe Universitato NSW. Bonega afero, bonegaj rezultoj... Mi certas ke ni baldaŭ vidos iom pli detalajn raportojn pri tiu ĉi evento. Intertempe, gratulojn al ĉiuj partoprenantoj kaj plej bonajn bondezirojn por multaj pliaj egale sukcesaj eventoj en la sekvonteco. Mi vere pasigis mian tempon tie bonege, ĝuplene kaj mi vidis ke ĉiuj vere amis tion

Gratulojn al ĉiuj organizantoj kaj partoprenantoj. □

Kiel Kontribui al Esperanto sub La Suda Kruco

Ni akceptas eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan materialon. Ni preferas ricevi kontribuojn per e-poŝto. Surpaperaj tekstoj devas esti klare tajpitaj per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Limdato por la septembro-oktobra numero: 15a de aŭgusto 2006

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643 ŝ York WA 6302 ŝ Aŭstralio
esk@esperanto.org.au



La Aŭstrialia Esperanto-Asocio

143 Lawson St ŝ Redfern NSW 2016 ŝ Aŭstralio
<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: **Igor Couto** | prezidanto@esperanto.org.au

Sekretario: **Miranda Lutz** | sekretario@esperanto.org.au

Kasisto: **Stephen Pitney** | kasisto@esperanto.org.au

Membreco: \$40 por individuo aŭ klubo [+ \$5 por familiano(j) ĉe la sama adreso].

Por studento aŭ pensiulo: \$25. Asocia membreco: \$10.

Pagu al Libroservo de AEA ĉe 143 Lawson St, Redfern NSW 2016.



La Novzelanda Esperanto-Asocio

P.O. Box 8140 • Symonds St • Auckland 1035 • Novzelando
<http://www.esperanto.org.nz/>

Prezidanto: Bradley McDonald | bradley.m@extra.co.nz

Kasisto: Jackie Fox

Sekretario: Howard Gravatt | hgravatt@ihug.co.nz

Membreco: \$40 por individuo, \$50 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo
(<20-jara: Klubo: \$1 por ĉiu ano

Sendu vian kotizon al la Kasisto ĉe la asocia adreso

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €24,00. Pagu ĉe UEA al la konto ael-w de la Libroservo de Aŭstalia Esperanto-Asocio

Wholly printed in Australia.

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302.
Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

esperanto sub **LA SUDA KRUCO**

if undeliverable return reply paid to:

D. Broadribb • P. O. Box 643 • York WA 6302 • Australia

Print Post Approved:

PP631048/00005

**SURFACE
MAIL**

POSTAGE
PAID
AUSTRALIA